

REVUO

Monata Aldono al „Esperanto Triumfonta“

NUMERO 9

1923

AŬGUSTO

Ĉu herooj?

Oni diras, ke herooj, heroegoj estas batalantoj sur la kampo de l' milito kaj venkintoj en kelkaj bataladoj: ĉar morti aŭ venki en la milito famigas pli ol io ajn.

Vidi la morton antaŭ okuloj, sed tamen resti kuraĝa, nepre estas kvalito de bravulo. Pri militistaj herooj oni kantas laŭdkantojn, skribas famajn historiojn; por ili oni konstrus monumentojn kaj memorsignojn, longe ili vivadas en la memoro de l' popoloj — kvankam iliaj laboroj kaj penoj daŭris ofte nur kelkajn tagojn.

Proksime de ĉi tiuj troviĝas aliaj bravuloj, kiuj neniam estas ŝatataj herooj, kvankam ili dum sia tuta vivotempo estis en la faŭko de l' morto, kvankam ili portadis multegon da penoj kaj multegon da mizero, kvankam ankaŭ ili havis en sia brusto koron kuraĝan...

Jen tiu kuraĝulo: malriĉa laboristo, la plej malkonata kaj tamen la plej alta inter ĉiuj herooj. Ĉiam lin turmentas malriĉo kaj malsato; ĉiam lin ŝarĝas zorgo pri infanoj, pri edzino, pri multaj aliaj: ĉiam per malsanoj timigas lin la mano de l' morto. Lia vivo estas ĉiama suferado, kaj neniam lumigos ĝin radioj de espero al pli bona, pli bela estonteco. Tamen li ne plendas, kaj ne malesperas. Ĉiumatene li eliras por labori, kaj lacigas sin ĝis malfrua vespero. — — — Kun ĉiama mizero kaj tento li bataladas por aliaj, eĉ malsaton kaj morton li ne timas. Lia koro ĉiam estas sentima kaj de la celo difinita li neniam flankiĝas.

Ĉu li ne estas inda havi la titolon: heroo? Granda estas nia kulpo, ĉar ni englutas eĉ la honoron de malriĉulo! Ĉiam oni predikas justecon — kaj ĉiutage oni vivadas en maljusteco.

Batalanto.



La formikejo.

El „Bläck och saltvatten“.

De Albert Engström.

Blovas forta nordorienta vento, kaj la arboj en mia ĝardeno flirtas pro la vento, kliniĝas malsupren kaj supren kaj mi bedaŭras la foliojn, kiuj devas resti je kiu ajn prezo. Estas aceroj kaj siringoj, kiuj batalas kontraŭ la ventego. Ifoje estas tia bruo, ke mi pensas, ke la arboj kantas sian mortkanton — mi apenaŭ kuraĝas vidi eksteren tra la fenestro — sed en la plej proksima momento la konturo de la foliamasoj sin levas kaj ŝajnas aroganta, kvankam ĝi tremas plej supre, kaj mi pensas:

Estu salutataj, miaj maljunaj arboj! vi estas fortaj! Mi sidas en mia salono kaj vidas, kiel vi laboras. Mi ankaŭ laboras: sed mi sentas min ŝirmata. Tio estas mia profito.

Mi volus scii, kion pensas la siringo, kiam la vento subite kaj forte influas ĝian vivon. Eble la siringo sentas la spiron de la spirito de l' vento kiel kareson. La siringo skermas kvazaŭ pro astmo, sed eble ĝuas. Tamen la vento signifas gimnastikon por la arboj. La vento estas la „Sistemo de Müller“*) por la arboj. Ili fariĝas pli fortaj kaj pli freŝaj per tiu ĉiama movado.

Mi ankaŭ pensas pri la malafablaj kaj malglataj pinoj, kiuj borderas miajn montojn. Ili montras sian pugnon al la maro, kie la ventego furiozas. Ili volus supreniĝi al la steloj, sed la ventego ilin klinas kaj ili rampas kiel serpentoj. Sed en tiu rampado estas granda protesto.

Pino diras: Mi estas decidinta iradi ĝis la maro: sed venas jaroj da ventegoj, kaj la pino sin konvulsie tordas. Mi cedas! Ĝi cedas, sed ĝia pinanimo estas plena je opozicio. Ĝia konstruaĵo fariĝas minacanta sistemo da pugnoj, kaj sian multiĝ-taskon ĝi preskaŭ forgesas pro la defenda problemo. Ifoje mi dezirus rigardi pure psike la laboron de l' pino, sed tiam mi timas ĉiam ĝian simbolan forton. Mi ja scias, ke ĉiu herbero, ĉiu likeno, ĉiu larvo batalas por la sama vivo, sed mi imagas, ke la vivo de la pino estas tre simila al la nia. Mi scias, ke tiun opinion diktas mia preferata ideo, kompari la homecon ĉe la pino kaj ĉe mi. Mi scias, ke ĝiaj movoj en la batalo kontraŭ la vento ne estas homaj. Sed same mi scias, ke ni homoj ĉiam estas devigataj traduki la lingvojn de aliaj estaĵoj en nian homan. Tio signifas limigitecon.

Mi ekpensis pri formikoj ĵus nun, ĉar formiko rampis sur la paperon. Ifoje mi imagas, ke la formikoj sociale staras pli alte ol ni, ke ili komprenis kaj plenumis la temon de socio pli bone ol ni. Tiu, kiu kliniĝinte al formikejo vidis kaj komprenis ilian samlaboran emon, nepre haltos kaj sin demandas, ĉu ili ne atingis pli altan ŝtupon ol ni, ni, kiuj atingis nur malamikecon kaj *bellum omnium inter omnes*.

*) Konata libro pri gimnastiko de la dano Müller.

Kial formikoj kaj abeloj ne povus esti atingintaj pli altan ŝtupon ol ni? Mi ne povas vidi iun kontraŭan kaŭzon. Ili estas pli fortaj ol ni. Ili antaŭentrenas sur malfacila vojo terure grandajn trunketojn kaj blokojn kaj ilin metas precize tien kie tiuj estas bezonataj. Mi ne volas peti la leganton difekti formikejon, ĉar oni ne devas malhelpi la laboron de aliaj homoj. Sed ĵetu tien folion aŭ serpenton aŭ arbobranĉon — kaj vidu kiel ili tuj kunlaboras! Kaj kiam mi staras kaj tra mia pligrandiga vitro rigardas la moveman societon, mi opinias kompreni iom de la granda dia leĝo kaj kompreni, ke mi iras laŭ iu direkto — dio scias kien.

Mi staris antaŭ kelkaj tagoj kaj rigardis la laboron de formiko. Mi supozas ke la gvidantoj ordonis fari la laboron aŭ eble, ke pro eterna leĝo ĝi sentis sin ema tiri la pecon al la formikejo. Ĝi estis putra lignopeco — almenaŭ ĝi al mi ŝajnis esti io simila. Mi tuŝis la formikon. Eble tio ne estis konvena sed mi sentis min kiel grandegulo antaŭ la malgranda, polurita, kvazaŭ per kiraso vestita estaĵo. Mi intencis nenion malbonan kaj mi tuŝis lin — aŭ ŝin — per la plej eble diskreta maniero. La formiko tuj forlasis sian lignopecon kaj komencis iri supren sur mia montra fingro. Mi tiuj pentis, ke mi malhelpis ĝian entrepenon kaj mi remetis ĝin inter ĝiajn laborantajn kamaradojn. Tiuj ĝi kuris al la direkto, kie ĝia lignopeco kuŝis, superampante aliajn laborantojn, puŝis ilin kaj, kiom mi povis vidi per miaj homaj okuloj, kelkfoje haltis, parolis kun konatoj kaj fine atingis sian lignopecon. Sed paro de ĝiaj kamaradoj jam estis komencinta movi la lignopecon kaj atakis la ĝustan posedanton per siaj akraj dentoj. Mi ja ne partoprenis je ilia interparolo, sed ili sin tuŝis kaj sovaĝe gestis per siaj palpiloj. La tuta afero finiĝis tiel, ke „mia“ formiko prenis la pecon kaj daŭrigis la marŝon supren al la formikejo. En la ĉirkaŭaĵo estis furioza vivo. Ili devis rebonigi la duonan konstruaĵon, ĉar dum la pasinta nokto vulpo estis disgratinta la belan palacon de l' formikoj. Mia formiko iris celkoncie en truon kun sia lignopeco. Dumtempe sin okupis aliaj formikoj je aliaj aferoj, folioj, semoj k. c. Kaj estis tre interese vidi kiel ĉiu faris sian propran laboron. Mia speciala formiko iris en truon, metis la pecon je la fino de l' truo kaj tie restis. Ŝajnis, ke la formiko tie sin mem batis por plivarmiĝi. Subite du formikoj venis, kaj trenis la pecon malsuperen en kaŝatan truvojon. Mia formiko tamen sidis trankvile kaj ŝajnis esti plenuminta sian devon. Alia paro da formikoj venis antaŭen al ĝi kaj ŝajnis paroli kolere kaj indigne. Mia formiko leviĝis kaj gestis per la antaŭkorpo. Fariĝis serioza juĝado. Mi restadis pro scivolo kio eble okazos. Kaj subite la du juĝistoj atakis la formikon kaj faris kadavron el ĝi. Ŝajnis esti ekzekuto, ĉar eble la formiko faris krimon. Kion mi scias?

Tiu formikejo estas proksima al mia hejmo. Mi ofte tien iras. La formikoj havas tie multan laboron, ĉar la formikejo

estas pli ol duone detruita. Kaj la somergastoj kelkafoje puŝas siajn bastonojn en la brunan altaĵeton.

Tiaokaze mi malamas la somergastojn. Mi pensas, ke la hejmo de formiko estas same valora, kiel la hejmo de somergasto. Imagu, ke oni agus kontraŭ la hejmo de somergasto same, kiel al la hejmo de l' formiko! Mi supozas, ke la somergasto krius al la ĉielo. Ĉu ne?

Sed la somergastoj povus kompreni ke, se ili per siaj bastonoj difektas formikejon, tio proksimume impresas la formikojn, kiel la anglojn, se iu dio tuŝus Londonon per vosto de kometo: tiaokaze ili eble estus pli ĝentilaj kaj pli afablaj, kio estas tre grava!

Trad. el sveda lingvo Axel Andersson.

Mahatma.

La „Lagon de l' amo kaj morto“ en Himalaja superstaras la montara frontono „Ŝina“ kun mirinda aspekto, kovrita alterne de arboj kaj neĝo. Tie restadas Mahatma, homo-dio, posedanta la kapablon aperi kaj malaperi, vivanta centjarojn kaj miljarojn, konstante juna. Sur la supro de Ŝina oni vidas dum nokto lumon — tiun laŭdire tie ekbruligas Mahatma, kaj kiu ekvidos ĉi tiun lumon, tiu fariĝos feliĉa, ĉar tio estas antaŭsigno de miraklo.

Mi suriris la supron kun inĝeniero, kiu tie aranĝis akvo-rezervujojn por malproksimaj urboj, vilaĝoj kaj vilaoj en la valoj. Sur la deklivoj kreskas ankoraŭ kverkoj kaj piceoj, floras admirindaj rododendroj, sed ĉi tie regas forta malvarmo. Ni jam estas super plantejoj de teo kaj kafo, super eŭkaliptoj kaj ciuhonoj. En la regiono de neĝo ni forsendis niajn servistojn kun la ĉevaloj malsupren, kaj nur mi kun la inĝeniero supreniris.

Dum la vojo ni rimarkis brunajn aglojn kaj flavetajn grand-okulojn kaj vulterojn super ni flugpendantaj. Ni atingis la supron. Plej rava perspektivo de l' mondo!

Montoj, montoj, montaroj ĝis senfino, kaj multaj el ili malaperas en la lazuro de l' ĉielo kaj super nebuloj. Teruraj, grandegaj, senmovaj, ŝtoniĝintaj ondoj! Profunde en la valoj sterniĝas la tuta poezio, belo, viglega vivo feliĉa, verdaĵo, ĉarmoj de ĝardenoj, diverskoloraj kaj persaj tapiŝoj. Vojoj, riveroj kiel desegnaĵoj de kapricema artisto, kasteloj kiel pintoj de rokoj kreitaj per homoj, urboj sur rokoj kiel el ruĝaj karopacoj kaj tiu eterna, terura Himalaja, ĉiam en nebuloj kvazaŭ ĝin vualus dioj kontraŭ la okuloj de l' homoj! Mi estas ravita per tiu senmezureco. Subite min ekinteresas la rando de iu roko: tie kuŝas homo nuda

sur tigras felo. Li estas bruna, kun nigraj, multaj haroj. Okulojn li havas grandajn kiel hindaj dioj. Sur liaj dikaj lipoj brilas rideto. Antaŭ li estas terfiksita tridento de Ŝiva kun punca girlando el rododendroj. Proksime estas estingiĝinta flamo. En la mano li havas fruktojn, juna faono estas apude; li min mansignis, Mi sidiĝis ĉe li. Mi demandas, kiu li estas. Li ridas kaj balancante la bruston li diras:

„Vi deziras konatiĝi kun mi? Hodiaŭ vespere mi ekbruligis mian flamon ĉe Naŝina-Calo“. „Vi konas min?“ mi demandas surprizite. „Mi konas ĉion! Vi deziras ekscii, kiu mi estas? Mi estas Elfo. Mi vivas de nememoreblaj tempoj. Mi estis pli frue, ol naskiĝis via Kristo. Mi konis Ramon kaj Kriŝmon. Mi ne posedas vestaĵon. Mi trairadas la suprojn de l' montoj (kaj li montris ĉirkaŭ la eternajn neĝojn, kunfandiĝantajn kun la firmamento). Por mi ekzistas nek malvarmego nek timo nek doloro nek malsano. Mi estis malsana, foje, antaŭ jarcentoj kiam mi intencis denove malsupreniri inter homojn, ĉar mi ilin amis. Nun mi ne sentas plu amon. Mi estas libera, mi estas dio.“ Kaj li karesis la faonon, kiu al li levis sian tremantan buŝegon. Mi ne miris pri lia rimarkigo pri Kristo, ĉar la „punditoj“ (Kalkutanoj) ofte pendigas en siaj loĝejoj bildon de l' Savinto. — „Kaj pro kio vi ne zorgas pri via patrujo, kiu suferas kaj pereas?“ Sur liaj dikaj lipoj ekaperis rideto plena je malŝato.

„Bruo eliras el malbono, malbono el bono. Ĉiu laboro estas vana. Amo estis sklaveco. Tio daŭris longe, ĝis mi pereigis en mi la amon al patro kaj patrino. En Hindio gepatroj valoras kiel dioj. Mi tamen min liberigis de ĉi tiu sento. Mi adonis mian patrujon, mi vidis ĝin grandega, poste ĝi elĉerpiĝis kiel arbo, kiu produktis tro multe da floroj kaj fruktoj. Komence mi per tio suferis — sed kion fari? Ĉion regas leĝo nerompebla. Nenio estas eterna, krom la Substanco mem, nekomprenebla Estaĵo, en kiu mi estas trempita. Fenomeno kaj universo estas fantomoj, Nun regas nin Okcidento, kies fino ne estas malproksima kaj neglora. Ĝia lumo mallumiĝos, la mia eklumiĝos“. — Li prenis feran triangulon, fosis per ĝi en la cindro — en ĝi estis eĉ ne unu brulŝtumpeto. „Vi deziras, ke mi ĉi tiun lignon bruligu?“ Li rastokolektis per sia triangulo amaseton da karboj. „Blovu!“ Mi blovis, sed la karboj estingiĝis. Do li kliniĝis al la karboj, diris kelke da vortoj en sanskrito kaj la karboj komencis bruli...

„Mi estras la fajron,“ li diris. Mi sentis atakon de malfortiĝo: ekmirego, malfido, dubo min ŝancelis. Ĉu li estas frenezulo, trompulo, sorĉanto, sanktulo? Sanktulo li ne estas, ĉar sanktulo estas humila, kaj tiu estis plena je fiereco. „Mi estas nigra“, li diris, prenis fruktojn kaj donis ilin al mi. Poste li levis la manon kaj benis min. — Mi revenis al la ruĝmiero, kiu dormis. Sed nevenkebla inklino tiris min al la ermito. Mi ek-

„Al diablo!“, elvokis la nekonato „tio ne aliigas la aferon. Ĉu vi volas, ke mi ŝanĝu mian vestaĵon. Se vi deziras, mi tre volonte faros tion.“

„Do restas nur tiu ebleco aĉeti vian kanonon, se mi ne volas, ke alia lando uzu la okazon. Kiom?“

„Milionon.“

„Mi konsentas! Vi estas tre lerta kaj kapabla...“

„Jes, certe, tiu kanono estas terurega armilo, tamen...“
La fremdulo fikse rigardis la generalon kaj daŭrigis: „Kion vi diros, se mi malkovros al vi malgrandan sekreton? Atentu: Mi eltrovis kirason kontraŭ tiu kanono, ŝildon, kiu estas tiel fortika, ke eĉ ne tranĉetas ĝin la plej granda grenadero.“

„Ĉu vi volas, ke mi freneziĝu?“ ekkiris la generalo, vi agas senhoneste!“

Ĉe ĉi tiuj vortoj la fremdulo sulkgis la frunton. „Kion, mi estus senhonesto? Ĉu vi povas kritiki malbone mian aerŝipon? Ĝi estas vere perfekta. Aŭ mian kanonon? Ankaŭ ĝi estas senmakula. Per kio mi trompis vin?“

„Vi parolis antaŭe pri la kiraso...“

„Permesu momenton“, interrompis la eltrovinto pripenseme, „la milita arto evoluas iom post iom, metode, senhalte. La grandaj eltrovaĵoj sur tiu ĉi kampo estas farataj unu post la alia. La fortika kiraso ne estis antaŭ la kanono, ĉi tiu ne antaŭ mia aerŝipo.“

Ambaŭ silentis longtempe. Fine la generalo demandis: „Kiom?“

„Milionon.“

„Konsentante.“

La nekonato ekstaris, etendis la manon al la generalo kaj estis forironta.

„Momenton ankoraŭ: Ĉu vi estas tute certa, ke la kiraso estas bona?“

„Sendube“, respondis la nekonato, kondiĉe ke oni ne eltrovos grenadon, kiu trapuŝos mian ŝildon.“

„Ĉu vi opinias, ke tio estas ebla?“

„Mi ne dubas pri tio.“

„Kiam okazos tio?“

„Jam hodiaŭ ĝi estas eltrovita.“

„De kiu?“

„De mi.“

„Ho, mi nun scias. Se mi aĉetos la novan grenadon, vi diros, ke vi posedas ankoraŭ iun pli fortikan ŝildon.“

„Certe mi tion faros.“

„Al diablo!“ ekkriis furioze la generalo; vi intencas elrabi mian landon kaj detrui ĝin. Estu malbenita kun viaj eltrovaĵoj!“

„Tiam la fremdulo solene kaj inde diris: „Sinjoro, ni agas laŭ logiko. Vi volas daŭrigi vian militpretadon, por ke via lando

fine ne pereu; mi opinias, ke tute egala estas la rezultato, ĉu en dek minutoj vi vendas vian landon al mi kaj pro tio mizerigas kaj detruas ĝin, aŭ ĉu via lando estas detruata de viaj malamikoj eble dum multe da jaroj. Sed rigardu min kiel genion de l' homaro, kiu atentigas vin, ke la plimulto de l' homaro sopiras pacon, ke multego da homoj pretigas la militon kontraŭ la milito, ke vi ne bezonos viajn armilojn kontraŭ la genio de l' homaro."

Post tiuj vortoj la fremdulo forlasis la militan ministerion.

La pilgrimado al Kevlar

Heinrich Heine.

I.

Ĉe l' fenestro staris panjo.
Kuŝis fil' en apati'. —

„Nu, leviĝu, mia kara,
Venas jen la procesi'."

„Pro malsano, patrineto,
Energio estas for;
Pro mortinta mia Grenjo
Tro suferas mia kor'."

„Al Kevlaro ni pilgrimu
Kun preĝlibro, rozari';
Vian koron ja sanigos
Dia Virgulin' Mari'." —

Jen ekflirtas la standardoj,
Pie kantas la ĥorar', —
El Kolonjo, urb' rejnlanda
Marŝas la pilgrimantar'.

La patrino ĝin sekvadas,
Kaj la filon gvidas ŝi;
Ambaŭ ili kantas hore:
Al vi gloron, ho Mari'! —

II.

Sankta Dipatrino brilas
Plenornome en Kevlar',
Ĉar hodiaŭ malsanuloj
Amasiĝas ĉe l' altar'.

Jen vidiĝas artaj membroj:
Vakspiedoj, vaksa man';
Ĉiu portas oferdonon
Laŭ la speco de l' malsan'.

Kiu vaksan manon donas,
Tuj saniĝas je la man';
Kiu donas vakspiedon,
Gojas pri pieda san'.

Al Kevlar' kelkiu iris
Lame, kiu dancas nun;
Multaj movas nun la fingrojn'.
Similintajn al harpun'.

Do, kandelon prenis panjo
Kaj transformis ĝin je kor':
„Donu ĝin al Dipatrino, —
Malaperos la dolor'."

Prenis li la vaksan koron,
Iris ĝeme al altar';
Larm' elfluas el okulo
Kaj el koro la deklari':

„Sankta Virgulin' ĉiela,
Kiu tronas super ter',
Ho, aŭskultu kun favoro
Mian plendon pri sufer'.

„Mi kun mia panjo loĝis
En Kolonj' ĉe rejna ond',
Kie estas la pleimulto
Da preĝejoj en la mond'.

Kaj apude loĝis Grenjo,
Kiun morto prenis for, —
Mian koron vi sanigu,
Liberigu de l' dolor'.

Mian koron resanigu, —
En vespero, en maten'
Preĝos mi kaj varme petos
Pri saniga via ben'."

III.

Panjo kaj malsana filo
En ĉambret' ripozis jam, —
Jen Ĉiela Virgolino
Dolĉe venis, sen ornam'.

Ŝi rigardas la mansanan,
Kaj metinte al la kor'
De la filo sian manon,
Kun rideto pasas for.

Panjo ĉion vidis sonĝe,
Sed precize ĝis la fund' —
Vekiĝinte ŝi aŭskultas:
Jen ekbojis laŭte hund'.

Kaj la filo kuŝis pala,
Lia vivo estis for,
Sur la vangoj ludas milde
La radioj de l' aŭror'.

Panjo interplektas manojn
Sub influo de l' vizi',
Kun pieco ŝi ekkantas:
„Al vi gloron, ho Mari'!"

Al la fratoj.

Moto:

... Kie vi estas,
Ho karaj fratoj vi miaj?

L. L. Zamenhof.

Ho karaj fratoj miaj,
Konataj, nekonataj
Proksimaj, malproksimaj,
Sed — kiel — fratoj — frataj:

Ho karaj fratoj miaj
En tuta vasta mondo,
Ĉu vin la sanginunda
Ne superverŝis ondo?..

Dum tiuj pezaj jaroj,
Mi malkvietan havis
Demandon sur la lipoj:
— Ĉu ond' vin ne forlavis?

Ĉu — kiam polvan nubon
Morgaŭa vent' disblovos —
Sopira mia koro
Ankoraŭ vin retrovos?..

Kaj kiam ĉesos sorto
La sangon jam tributi,
Ĉu mi ankoraŭ povos
Plennombre vin saluti?..

Ho karaj fratoj miaj,
Malĝojaj estis jaroj:
Homaro sange pagis
Por trompoj, por eraroj.

Ho karaj fratoj miaj,
Terura estis tempo;
Do nun — post longa vintro —
Revenu jam printempo!

Homaro kare pagis
En tiu sanga draŝo;
Do nun antaŭeniru
Progres' je unu paŝo!

Por ke en tiu mondo,
Tentita nun kruele,
Fariĝu jam pli bone,
Pli juste kaj pli hele.

Por ke malhelan ombron
Ne ĵetu efektivo
Sur nian puran tendon
En tiu nova vivo.

Ho karaj fratoj miaj,
Konataj, nekonataj,
Proksimaj, malproksimaj,
Sed — kiel fratoj — frataj!

Ho karaj fratoj miaj
Semitaj tra la tero,
Nin ree vivo vokas —
La vivo por l' afero.

Nin ree vokas peno
Persista kaj senlaca
Por tiu ĉi Estonto
Feliĉa, hela, paca...

Por tiu ĉi de koroj.
Al koroj la atako,
Kun mano en la mano,
Kun brako ĉe la brako.

Stanislaw Braun. Łódź.



Fervojo.

*Ŝtalaj kordoj streĉitaj tra vasta lando.
Tra mia koro.*

*Ŝtalaj kordoj atendas.
Vasta lando aŭskultas.
Koro tremas.*

*Jen venas la Majstro —
Giganto el ŝtalo,*

*Sonigas per ŝtala ringo la ŝtalajn kordojn.
Ŝtalo kantas sub ŝtalo.*

*Melodio fortiĝas.
Murmuro.*

*Tondro.
Uragano.*

*Manifesto de Potenco.
Tekniko triumfanta.*

M-ov.

Neligitaj pensoj.

De Otto Wolfgang.

La mondo estas ronda kaj estu rigardata de ĉiuj flankoj ne nur de unu fiksa vidpunkto.

Ĉiu opinio estas — nepre — la malo de progreso.

Ŝtato: grupo da nerespondigeblaj regantoj, kiuj rajtas apliki al amaso da regatoj agojn, pro kiuj la unuopa ŝtatano estus punata per severa malliberigo.

Posedaĵo estas nek ŝtelaĵo nek sankta.

Ekzistas sufiĉo da ĉio por ĉiu. Sed socio, kiu protektas marĉandulojn kaj estigas en mizero honestulojn, meritas esti pri-rabata laŭ egaliga justeco.

Unu fojon mi volus arigi ĉiujn militkriplulojn kaj prezenti ilin antaŭ kunveno de „patriotoj“, unu post la alia, kiel ili ŝancelas en la kovulsio de siaj nervofragmentoj la difektitajn kraniojn, kiel ili batas al la kava brusto per tremeganta pugno aŭ malfermas skatolon montrante en ĝi sian elprenitan okulon!

Kaj iliaj malfortikaj lambastonoj estu elpendigataj kvazaŭ „Menetekel-aĵoj“, kiel razista ŝildo antaŭ la borso!

Tiam mi dezirus vidi, ĉu ankoraŭ ekzistus unu „hieno“ (fihomo), kiu krius: „Hura“ — —

Esperantigis *St. M.*, Wien



Sunradieto.

*Hieraŭ,
Kiam ĵus la suno estis subirinta,
La fagabar' sin banis
En verdoraj ondoj de vesperkrepusko,
Lastlastan
Senspiran
Sunradieton mi kaptis.
Senpripense estis ĝi irinta
En l' arbaro vojon nekonatan,
Ne retrovis plu al sun-patrino,
Senhelpe staris,
Plorante plendis feliĉon perditan.*

*Kara sunradieto,
Ĉiela lumanimeto,
Ho venu en mian koron,
Ĝi estas al vi favora!
— Jen sunradieto ekloĝis en mia koro.*

*Nun mi kunportas ĝiajn zorgojn kaj dolorojn.
Rekompence ĝi pruntas al mia kor' sian lumon.
Kune nun vivas ni ambaŭ
Feliĉaj en malfeliĉo.
Sunradieto jam volas neniam forlasi min;
Ĉar ni ambaŭ
Kompletigas unu la alian
Tiel mirige.*

T. J.

Arto.

La arto de l' boskanoj.*)

La modo ekzotika, kiu depost jaroj regas en la eŭropa kulturmondo, prefere sin okupis pri artproduktoj de popolo, kiuj (kiel ekz. la insulanoj de Suda Maro kaj la indiĝenoj de l' origina Ameriko) pro sia inklino al geometriaj figuroj kaj kubistaj formoj, montras parencecon al la plej novaj stiloj de eŭropa deveno. Sed ekzistas inter la primitivuloj ankaŭ popoloj, kiuj favoras puran naturalismon kaj tial konc. sian kulturrangon estas kompareblaj nur al la anoj de l' unua „ŝtonepoko“.

Jen kelkaj klarigoj pri la arto de l' sudafrikaj boskanoj laŭ plej novaj esploroj.

Kiel la homo de l' unua ŝtonepoko, tiel ankaŭ la sudafrika boskano estas ĉasisto; li vagas nomade tra arbaroj kaj stepoj, Li atingas altecon de ne pli ol 1,40 metroj, havas forte kaviĝintan ventron, spiralfarmajn harojn kaj malaltajn larĝajn orelojn sen lobetoj. La boskanoj nuntempe preskaŭ formortis; la moderna civilizo postulis ilin kiel viktimon. Ĉar ili ne volis sin subigi al la blankuloj kaj ankaŭ ne volis kulturi la teron, ili estis ekstermataj kaj restis de ili preskaŭ nenio ol ilia altagrade perfektigita arto. Manĝado, dormado kaj trinkado estas la solaj bezonoj de tiu pigmea popolo, kiu, malalta kaj facilmova, povis sin kaŝi sur arboj aŭ sub folioj, — kiu ne konis laborumon je metalo kaj ŝtatan kunligon.

La konstanta observado al ĉaseblaj bestoj kondukis ilin al preciza, ekzakta reproduktado de l' naturformoj. Iliaj surrokaj pentraĵoj vidigas geniecon, forton kaj klarecon konc. perceptadon kaj formadon, kiuj ĉiam denove nin forte impresas. Ili havas mirindajn, lumajn kolorojn, ofte akre kontrastigitajn; sed kelkafoje iliaj koloroj ankaŭ transfluas unu en la alian per nuancoj plej delikataj. La boskano pentras laŭrigarde. Esploristo rakontas pri sia vizito al kaverno evidente forlasita de la boskanoj pro tima konsterno. Sur la tero kuŝis ŝelo testuda de aparta speco, tre diferenca de la ceteraj. Je la muro de l' kaverno estis ĵus pentrita reproduktaĵo de la sama besto, kun la sama signoj kaj preskaŭ en la sama sinteno, — do precize pentrita laŭ la vivanta modelo. La farboj, disfrotitaj per graso kaj surigitaj sur la rokon per la mano aŭ per osta bastoneto, devenis el la ĉirkaŭaĵo. Ilia konserviĝemo estas tre forta. Oni trovis ekzemple pentraĵojn en regionoj, kie la boskanoj elmortis jam antaŭ 200 jaroj.

Ankaŭ scenojn pri ĉasado reproduktis la boskanoj, plie kafrojn, kiuj paŝtas brutaron, blankulojn, kiuj kondukas ĉevalojn, homojn kun ĉasmortigitaj bestoj, leonojn, kiuj atakas homojn, boskanojn, kiuj rabas brutojn de buro, scenojn pri dancado kaj aliajn. — Per tiaj reproduktaĵoj de grupoj la boskanoj altiĝis

*) hol. boschjesman; g.: Buschmann; a.: Bushman; fr.: Bochimane.

super la kulturŝtupon de l' unua ŝtonepoko; ĉar la ekapero de l' homo sur pentraĵoj apartenas al epoko pli evoluinta.

Estas rimarkinde, ke ili observas bestojn plej precize kaj ekzakte, sed aliparte ne vidigas komprenon por la pli nobla formado de l' kapo, por la esprimo de la intelekto aŭ por la diferencoj inter homoj. Nur rasojn ili diferencigas evidente: la pigmea popolo de boskanoj videble distingiĝas de la altstaturaj kafroj kun longaj membroj, aŭ de la blankuloj. Precizigo de l' vizaĝo preskaŭ malestas. Sed la sekseco tie, kiel ĉe ĉiuj primitivuloj, reliefiĝas krude kaj malkaŝe. Sendube ĉiuj tiuj pentraĵoj estiĝis sen religia fundamento, — sole el stiligemo, komuniko kaj imitado. Plastikajojn oni preskaŭ ne trovis ĉe la boskanoj. Sed la pentraĵoj ĉiutempe diskutigos la gravan problemon, kiel popolo apenaŭ eliĝinta el besta stato, kapablas produkti tian arton, ke la arto per tuta forto kaj beleco sin montras eĉ antaŭ la kulturo!

Ĉu eble la arto estas la komenco de l' kulturo kaj de l' homaro entute?

Mudjekeewis.

Scienca.

Signoj de Morse.

De V. Jaroŝ, Mistek, Ĉsl.

Kelkfoje okazas, ke iu ekvidas amikon en granda malproksimo. Volonte li ekparolus al la amiko, sed malhelpas, ekzemple, rivero aŭ intermontaro kaj mankas rimedo por interkompreniĝi je tiel granda distanco. Por tiu celo li povus uzi la signojn, kiujn jam delonge uzas telegrafistoj, soldatoj, skoltoj k. a.: la signojn de Morse. Pri tiuj signoj mi volas paroli en mia artikolo, kaj en la venonta numero mi donos ŝlosilon por signali la morsean signaron per flago aŭ mano aŭ por tiuj, kiuj ne povas vidi unu la alian, ekzemple en arbaro, inter montoj per fajfilo.

Multaj scias, kiam oni per montra fingro faras movon al si, ke tio signifas; „Venu!“, kiam oni per mano faras movon for de si: „Foriru!“ Kiam oni kelkfoje sinsekve faras movon, duone aŭ kvarone turnante manplaton, tio signifas: „Ne!“ La saman signifas, kiam oni movas la kapon dekstren kaj maldekstren. Jesante oni movas la kapon kelkfoje supren kaj malsupren. Volante esprimi: „Kuŝiĝu!“, aŭ „Restu!“, oni montras per la fingro teren. Senmove restas staranta, kiu ne komprenis. „Obeu!“ aŭ „Estu atenta!“ oni esprimas, kelkfoje minace skuante la manon kun supren levita montra fingro. La ordonon: „Atentu! Haltu!“ signas mano vertikale levita super la kapo. „Tie!“ aŭ „Tien!“ signas mano horizontale etendita. Krom tiuj cititaj signoj ekzistas ankoraŭ multaj aliaj, ekzemple kun

bastono; sed nia celo estas, ke ni sciu uzi morsean signaron, kiu aplikas nur punktojn kaj strekojn per la tuta alfabeto, por ciferoj, interpunkcioj kaj specialaj cifroj.

La signojn oni faru ne tro rapide, sed plej precize kaj kompreneble. Oni ĝuste paŭzu inter du literoj. Punkto daŭru ĝenerale unu sekundon, streko tri sekundojn. paŭzo tri aŭ kvar sekundojn. Akceptanto respondu ĉiam, ĉu li komprenis aŭ ne.

Uzante flagon, oni svingu ĝin tiel, ke ĝi estu bone videbla. Nokte oni uzu lumon anstataŭ flago. Uzante fajfilon, oni atentu, ke ĝi estu bone aŭdebla.

Kiam la taglumo malboniĝas, oni plirapidigu la sinsekvon de punktoj, kaj strekoj, kiam la lumo pliboniĝas, oni malrapidigu la sinsekvon.

Por signali per flago sufiĉas preni blankan poŝtukon kaj alligi ĝin al bastoneto (alia koloro, ekz. flava, verda blua ne estas bone videbla).

Volante komenci perflagan interparoladon, oni tenu la flagon super la kapo; tio signifas, ke oni volas signali. Vidante, ke iu same staras kun super kapo tenata flago, oni signalu „nk“ —./.—. (la ekvokon). La akceptanto respondu „n“ aŭ „nn“ —./.—. La flagon oni svingu tiel, ke ĝin bone vidu la akceptanto; la sinalanto atentu je vento tiukaŭze kaj serĉu pozicion favoran je vento.

Punkton oni signalas: per unu flago, movante la flagon de super la kapo al la dekstra flanko; per du flagoj (du personoj): unu movu la flagon de super la kapo dekstren, la alia de super la kapo maldekstren, ambaŭ movu la flagojn samtempe.

Strekon oni signalas, movante la flagon de maldekstra flanko super la kapon al dekstra flanko; se du personoj signalas, oni movu la flagojn de ekstera al interna flanko, kiel ĉe la punkto.

Signalante nur per mano, oni tenas ĝin vertikale super la kapo por signali punkton, kaj oni etendas ĝin horizontale flanken por signali strekon. Signalante per du manoj, unu mano etendita flanken signifas punkton, du manoj etenditaj ambaŭflanken signifas strekon.

Signalante per fajfilo oni ekfajfu mallonge por punkto kaj longe por streko.

Kompreneble, por interkompreniĝo oni povas uzi iun ajn ŝlosilon. Sed por la ĝenerala uzado estas necese interkonsenti pri unu difinita ŝlosilo (same kiel ĉe lingvo internacia). Ankaŭ estas kompreneble kaj necese ke, kiu deziras ion signali, tiu devas nepre ankaŭ scii kaj kompreni la signaron; alie estus tiel, kiel ĉe multaj profesoroj kaj plibonesciuloj koncerne Esperanton: Ĉiu pretendas pli bone scii pri Esperanto ol la Esperantistoj mem, eĉ ne lerninte nian lingvon, ja — eĉ ne teninte Esp. gramatikon en la mano. Ne valoras vortoj de personoj, kiuj ne konas kaj scias la aferojn.

Ekprovu lerni la morsean signaron, kaj dum ekskursoj vi ĝuos plezurojn! La lernado devas esti facila kiel ludaĵo; ĝi ne trostreĉu la cerbon, alie vi perdos la paciencon antaŭ la finlernado. Dediĉante ĉiutage kelkan tempon, vi venos baldaŭ al la celo. Ekzerco faras majstron.

Pri Radiumo.

Kvankam la radiumo estas trovata en multaj lokoj de la tero (ekzemple en Bohemujo, Portugalujo, Aŭstralio kaj Anglujo, tamen Usono estas la ĉefproduktanto de tiu ĉi stranga elemento. Laŭ fidinda takso ĝis nun en Ameriko entrafikiĝis proksimume 150 gramoj da radiumo, valorantaj 20 milionojn da dolaroj. Tiu amerika radiumo enhavas 20% da uranoksido kaj troviĝas sporade meze de rokoj, el kiuj oni ĝin eligas pere de diamantboriloj; ĝi estas mane dispecigata kaj transportata per muloj de la trovejo ĝis fervoja stacio tre malproksima. Ĉar la trovejoj ne kuŝas unu apud la alia kaj por la laborumado de unu kilo da minaĵo bezoniĝas unu kilo da acidaĵo, estus malekonomie laborumi la minaĵon tuj ĉe la trovejo. Al la malfacilaĵoj de l' kolektado kaj transportado de la minaĵoj aliĝas plie ampleksaj ĥemiaj procedoj; pri tio oni ekhavas imagon ekscianta, ke 200 ĝis 400 tunoj da minaĵoj estas laborumotaj, por gajni unu gramon da radiumo.

Jen konciza priskribo de la gajnado de l' radiumo el ĝiaj minaĵoj:

Unue la kolektitaj minaĵ-pecoj estas muelataj kaj senlesivigataj; poste oni intermiksas la solvaĵon per sulfacido, por sedimentigi la ne solveblan radiumo-bariumo-sulfaton. La sedimenton oni ŝanĝas je solvebla karbonato kaj la rezultintan solvaĵon je bromido kaj poste je ĥlorido. Ĉiam la radiumo estas asociigita kun la bariumo kaj, por apartigi la radiumĥloridon de la bariumĥlorido, oni utiligas la fakton, ke en saturitaj solvaĵoj la unua estas pli malfacile solvebla de la lasta. Entute oni bezonas eble 2200 apartajn kristaliĝojn, por produkti radiumĥloridon je pureco de 95 procentoj. — Super la trogoj enhavantaj la radiumsolvajon, konstante funkcias grandaj ventoliloj, por forpeli la gasforman elradiaĵon kaj por malebligi, ke la lasta disfalu en la laborejo kaj formu sedimentojn de radiumo, kiu elsendas malutilajn, detruigajn radiojn. La kontakto kun ĵus sedimentigita radiumsulfato ne estas danĝera, ĉar tiu ĉi preparaĵo komencas disfali nur tri aŭ kvar tagojn post la sedimentiĝo. Laboristoj kiuj konstante kontaktiĝas kun radiumsalo, en la daŭro de l' tempo komencas suferi je malpliigo de la sangokorpetoj kaj do fariĝas anemiaj. Pro tio en la radiumproduktejoj oni regule kontrolas la oficistojn koncerne la nombron de la sangokorpetoj, por forsendi la malfortigitajn malproksimen, por ke ili reakiru la normalan staton.

Malgraŭ tio la radiumo estas ĉefe uzata en la sanigarto; unuavice oni kuracas per ĝi kancerajn ulcerojn, sed ankaŭ oni aplikas ĝin, por forigi verukojn kaj denaskajn haŭtmakulojn. Duavice oni uzas radiumaktivajn materiojn por fabriki specialajn lumigilojn necesajn ekzemple por lumantaj ciferplatoj, komutiloj ktp.

Lastatempe amerikaj firmoj fabrikas ankaŭ tielnomatajn spintariskopojn, kiuj konsistas el malgranda cilindro kaj servas kiel sciencaj amuziloj. Sur la fundo de l' cilindro troviĝas iomete da radiumo (valoranta eble $\frac{1}{20}$ da cendo) intermiksita per zink-sulfidaj kristaloj. Rigardante dum mallumo en la tubeton tra lenso fiksita je la supra parto de l' cilindro, oni rimarkas multegon da etaj fajreroj. Se la zinksulfido ne detruigus iom post iom per la konstanta „bombardado“ flanke de la radiumradioj, la fulmado kaj fajrerado daŭrus 2500 jarojn, t. e., ĝis la plena konsumiĝo de l' radiumo.

Rutherford elkalkulis, ke unu gramo da radiumo ĉiu-sekunde elĵetas 140 000 bilionojn da parteloj. Tio pruvas, kioman, kvantegon da energio entenas la radiumatomo! *Kiuza.*

Humoro.

Trafa respondo.

Juna, ne konata verkisto sciigis la tre konatan romanverkiston de teatraĵoj, la pli junan Dumas, ke li havas tre bonan ideon pri teatraĵo, kaj ĉu Dumas eble volas partopreni je la el-laborado de la teatraĵo kun li.

Dumas reskribis koleriĝinte pri tio, kion li opiniis aroganteco: „Sinjoro, kiel vi povas permesi al vi kunjugi ĉevalon kun azeno?“

La sekvintan tagon Dumas ricevis jenan respondon: „Sinjoro, kiel vi povas permesi al vi, min nomi ĉevalo?“

Super.

A: „Mia ĉefo devas aĉeti ĉiujare kvin barelojn da inko nur por la punktoj, komoj kaj similaj signoj en la korespondado de nia firmo.“

B: „Tio signifas nenion. Mia ĉefo ŝparas ĉiujare ok barelojn da inko nur pro la forlasado de tiuj signoj en la korespondado.“

Pro kio?

„Ĉu vi ne volas asekurigi vin kontraŭ ŝtelo?“

Kial? Mi ŝuldas al mia mastrino jam por ses monatoj la lupagon. Ŝi jam atentis, ke neniu forportos ion el mia posedaĵo.“

Revido.

„Pardonu, fraŭlino. Ĉu vi ne estas la fraŭlino de hieraŭ vespere, sen kiu mi ne povas vivi?“

